

# LA TRAGEDIO DE LA STRATO MESLAY

Monologo de René ESSE kaj GERNY

Tradukita kun la permeso de S<sup>ro</sup> Sulzbach, eldonisto de muzikverkoj, 13, faubourg St-Martin, Paris.

---

*(Sinjoro alvenas. Li estas malgajega kaj havas kelkajn gazetojn en mano).*

— Vi vidas viron frenezigan... mi ĵus faris krimon... cetere, la matenaj ĵurnaloj eble raportas pri ĝi. (Li prenas ĵurnalon, ĝin malfaldas, kaj legas). Ni vidu ĉi tiun, « L'Écho de Montparnasse ».

« Hieraŭ vespere, je la sepa kaj duono ĉirkaŭe, bedaŭrinda malfeliĉo dolore impresis la loĝantojn de la strato Meslay. Je la n<sup>o</sup> 66<sup>a</sup>, eksplodbruo subite aŭdiĝis. Iu sinjoro estis ĵus trifoje pafinta per revolvero al sia bopatrino, kiu falis en laĝeton da sango. La mortiginto forkuris saltante en la straton tra la fenestro de sia loĝejo, kuŝata sur la unua etaĝo. Li estas viro de dudek kvin ĝis tridek aĝa, maldika, senbarba. Li havis altforman ĉapelon, nigran pantalonon kaj nigran frakon. Ni donas zorge lian priskribon, por ke la publiko helpu la policon en ĝiaj serĉadoj. »

— Nu ! mi estas nepre trovota ! ĉar, vi tion divenis, mi estas la sinjoro, kiu mortigis sian bopatrinon, sed vere nevole. Ni vidu ĉi tiun, « L'Estonteco de



Batignolles »... (Li malfaldas alian ĵurnalon kaj legas).

« Hieraŭ vespere, je la sepa kaj duono ĉirkaŭe, kortuŝanta dramo dolore impresis la loĝantojn de la strato Meslay. Je la n<sup>o</sup> 66<sup>a</sup>, granda eksplodbruo subite aŭdiĝis. Iu sinjoro estis pafinta per pafileto al sia bopatrino, kiu falis en lagon da sango ; ŝia stato estas senesperiga ! La mortiginto forkuris, saltante en la straton tra la fenestro de sia loĝejo, kuŝata sur la dua etaĝo. Li estas viro de tridek kvin ĝis kvardek jara, duondika, liphara. Li havis melonforman ĉapelon, griznigran pantalonon kaj ĵakon. Ni donas zorge lian priskribon, por ke la publiko helpu la policon en ĝiaj serĉadoj. »

— La afero ne okazis tute tiele, sed tio ne gravas... malgraŭ tio, mi estas nepre pendigota... ni vidu tiun, « L'Organo de Charonne ». (Li malfaldas alian ĵurnalon kaj legas).

« Hieraŭ vespere, je la sepa kaj duono ĉirkaŭe, terura tragedio dolore impresis la loĝantojn de la strato Meslay. Je la n<sup>o</sup> 66<sup>a</sup>, gravega bruego subite aŭdiĝis. Iu sinjoro, per dinamita kartoĉo, estis eksplodiginta sian bopatrinon, kiu falis en lagegon da sango. Oni ne povis ŝin revivigi. La mortiginto forkuris saltante en la straton tra la fenestro de sia loĝejo, kuŝata sur la kvara etaĝo. Li estas viro kvindek aĝa proksimume, dika, vangbarba. Li havis molan ĉapelon, helgrizan pantalonon kaj veston. Ni donas zorge lian priskribon, por ke la publiko helpu la policon en ĝiaj serĉadoj. »

— Tio ĉi tute ne estas la afero... mi ektrankviliĝas...



ni vidu ĉi tiun, « La Vekiĝo de Invalides ». (Li malfaldas ĵurnalon kaj legas).

« Hieraŭ vespere, je la sepa kaj duono ĉirkaŭe, terurega katastrofo dolore impresis la loĝantojn de la strato Meslay. Je la n<sup>o</sup> 66<sup>a</sup>, abomena kaj gravega bruego subite aŭdiĝis. Iu sinjoro, per barelo da nitro-glicerino, estis eksplodiginta sian bopatrino, kiu falis en veran oceanon da sango. Ŝi estis tute dispecigita ! La mortiginto forkuris saltante en la straton tra la fenestro de sia loĝejo, kuŝata sur la sesa etaĝo. Li estas viro sesdek jara ĉirkaŭe, kolosa, kaj portas dikan longan barbon. Li havis ĉapeton, blankan pantalonon kaj bluan kitelon. Ni donas zorge lian priskribon, por ke la publiko helpu la policon en ĝiaj serĉadoj. »

— Mi estas nun tute trankvila. Sed, malgraŭ tio, mi mortigis mian bopatrino ! Fine, ni vidu ankoraŭ tiun ĉi : 3<sup>a</sup> eldono... ĝi nepre havas pli plenajn sciigojn, — « La Oficiala Gazeto de Montholon ».

« Hieraŭ vespere, ĵus antaŭ ol ekpresigi, ni sciigis pri dramo, kiun oni estis trograndiginta. Post enkento, jen estas la vera raporto pri l' okazaĵo. Hieraŭ vespere, je la sepa kaj duono ĉirkaŭe, malforta eksplodbruo aŭdiĝis en la strato Meslay. Je la n<sup>o</sup> 66<sup>a</sup>, iu sinjoro pretiĝante por iri en vesperfeston, prenas sian revolveron. La armilo okaze pafas ; lia bopatrino, tre impresebla virino, svenas kaj falas tiel malfeliĉe sur sian nazon, ke ŝia falo okazigis gravan sangadon. La sinjoro, kredante ke li mortigis sian bopatrino, forkuras en la straton saltante tra la fenestro de sia loĝejo kuŝata sur la teretaĝo.



Post unu kvarono da horo, la bona virino rekonsciigis kaj lerta ĥirurgiisto, rapide alvokita, sukcesis eltiri la kugleton el la seĝodorso ! Tiu estiminda persono, ĉagrenata pro la malapero de sia bofilo, uzas la publikecon de nia ĵurnalo por lin peti, ke li revenu senprokraste en ŝiajn brakojn. »

— Savita ! Dankon, Dio mia ! Mi kuregas kisadi mian bopatrinon !....

*(Li eliras kurante).*

---

---

## La Baño de la Pastro <sup>(1)</sup>

de Georges MAUREVERT

Tradukita en Esperanto kun la permeso de l'aŭtoro, kaj deklamita de la tradukinto dum la 1<sup>a</sup> Kongreso de Esperanto.

---

Sinjoro la Pastro ĉirkaŭrigardas, maltrankvile... La loko estas dezerta, ĉarma kaj favora. La malgranda golfeto estas ŝirmata kontraŭ la nordaj ventoj de larĝaj ŝtonegoj, pentrinde tranĉataj kaj ombrigataj de abioj.

(1) Publikigita en « Tra la Mondo », 1<sup>a</sup> jaro, 1<sup>a</sup> N<sup>o</sup>.



Trans la golfo, ne malproksime, oni ekvidas la bluajn montetojn de « Lanvezel ». Similaj al grandaj papilioj sur la ondoj, la barkoj de « Douarnenez » surnaĝas, puŝataj de la vento.

Blanka velo !.... Estas la barko de Sinjoro la Juĝisto, kiu fiŝkaptas ; la juĝisto vidas tre bone, sed estas certe, ke li ne povus rekoni la pastron « Le Clech », de kie li estas !....

Sinjoro la Pastro estas sola, tute sola.... La maro estas blua, tiel blua kiel la ĉielo ; kiel la maro, tiel kvieta estas la ĉielo.... Nenia bruoj, krom la akra alvoko de la mevoj kaj la dolĉa murmuro de la alfluo kontraŭ la rondaj ŝtonetoj de la marbordo.

Nu !.... Sinjoro la Pastro demetas sian pastran veston ; li faldas ĝin zorge kaj metas ĝin sur ŝtonegon, kiu nur post tri horoj povos esti atingata de la maro. Li demetas siajn ŝuojn ornamitajn de arĝentaj bukoj, sian mallongan pantalonon, siajn ŝtrumpojn... Sinjoro la Pastro ĉemizvestata, rigardas ĉirkaŭen.... Neniun !

Honteme, li metas blankan kalsoneton larĝe striitan je nigraj linioj horizontalaj.... Li demetas sian ĉapelon, poste sian ĉemizon, kaj metas ilin sur la pastran veston ; sed li konservas siajn sanktajn medalojn.

Dika kaj grasa, kiel atleto, kun sia bona ruĝa vizaĝo, Sinjoro la Pastro antaŭeniras al la maro.

La ondetoj kisas liajn nudajn piedojn. He ! he !! estas malvarme !.... Frosttremo skuas la grason de Sinjoro la Pastro... Nu ! Kuraĝe !... Li antaŭeniras malrapide, malrapide, liaj brakoj krucigataj sur lia



vasta brusto, la ŝultroj skuataj de tremoj... Liaj van-  
goj ŝveliĝas, kaj liaj lipoj elspiras longajn frostsensentemajn ekĝemojn... Nu ! Sinjoro la Pastro ! Nu !....  
Mirinde !... Li estas subakvigita ĝis la brusto en tiu akvo agrabla kaj tiel pura, ke oni vidas la fiŝetojn kaj la krabojn, kiuj trakuras inter la markreskaĵoj... Unu, du, tri... Sinjoro la Pastro eknagaĝas, kvazaŭ li estus perdata !

He ! he ! Sinjoro la Pastro ja tre bone nagaĝas ! Lia graso subtenas lin sur la akvo kiel korko, kaj li nur devas movi brakojn kaj krurojn por antaŭeniri... Li baldaŭ forestas kvindek metrojn de la bordo..... Sinjoro la Pastro estas lacigita... Haltu ! Nun, momento de ripozo !

La brakojn etendante, la korpon senmovigante, trempata ĝis la oreloj, Sinjoro la Pastro rigardas la puran ĉielon, kaj li dankas Dion pro tiu simpla feliĉo... Ha ! Dio mia !... Kiel bone oni estas !... Kia ĉarma malvarmeto !... Kia perfekta ripozo !... Kia feliĉegeco !... Oni restus tiel dum la tuta vivo kaj la tuta eterneco !... Naĝi en la etero !... Nuntempe, Sinjoro la Pastro konsideras nur tia la rekompenco de la feliĉuloj kaj de l' elektituloj.

Ho ve ! Oni ne devas trouzi la plej bonajn aferojn. Bano, kiu daŭras dek minutojn tute sufiĉas por homo kvindekjara.

Sinjoro la Pastro renagaĝas al la marbordo, ĝis kiam liaj piedoj tuŝas la sablon. Li eliras bedaŭre el la akvo kaj returneniras, kien li estas demetinta siajn vestojn.

Nu !... Kie estas liaj vestoj ?.... Li bone memoras



esti demetinta ilin sur tiun ĉi ŝtonegon !... Li estas certa pri tio ! Li ĵurus pri tio !...

Li rigardas maldekstren, dekstren... Nenion !... Malaperintaj ! Forflugintaj !... Sinjoro la Pastro palegiĝas... Ne pro malvarmo li tremas, sed pro timo !... Sendube, oni estas forŝtelinta ilin de li !

— Kukole !... Bonan tagon ! Sinjoro la Pastro ! !

Ektremante, Sinjoro « Le Clech » rigardas tien, de kie venas la moka alvoko... Kaj kiun li vidas, starantan sur la ŝtonoj, kvin aŭ ses metrojn super si, ridantan kiel frenezulineto ?... « Yvonne Le Guermeur », juna fraŭlino el sia paroĥo, beleta brunulino kun la vivaj okuloj de sciuro, tiel maltimiga kiel birdo, tiel ruza kiel vulpo.

Ŝi tenas en siaj brakoj la vestojn de la Pastro, kaj ŝi ridas, ridegas ! Sinjoro la Pastro furiozas !...

— Vi ne hontas, petolulino ?... Rapide, realportu miajn vestojn !... Mi diros tion al via patreto, kaj vi ricevos severan punon !...

« Yvonne » ankoraŭ pli forte ridas.

— Nu, sentaŭgulineto, malsupreniru rapide aŭ mi iros al vi, mi !...

— Nu, venu tien ĉi, Sinjoro la Pastro !...

Kun decidema vizaĝo, Sinjoro la Pastro antaŭeniras iom !... Aj !... Li estas nudpiede. La friponino estis ŝtelinta eĉ liajn ŝuojn ! Kaj la ŝtonetoj kontuzas liajn piedfingrojn... Kiel suprenrampi al ŝi ?... Kaj ŝi ridas pri lia malgaja mieno.

— Aŭskultu, Sinjoro la Pastro, mi bonvolas redoni ilin al vi, sed kondiĉe !

— Kondiĉon, al mi, serpenteto !



Sinjoro la Pastro furiozas, kaj li levas minacan pugnon al la senhontulino, kiu mokas lin.

— Jes, Sinjoro. Kial vi diris al mia patrino, ke mi estas tro juna por edziniĝi kun « Yvon » ĉe la Sankta Miĥaelo?... Mi estas dekokjara, Sinjoro la Pastro, mi havas sufiĉan aĝon por edziniĝi !...

Sinjoro la Pastro sufokiĝas, kaj frosttremoj ekstremitigas liajn ŝultrojn kaj liajn brakojn !...

— Vi kuraĝas ! Falsa bravulino !!... Miajn vestojn, mi volas miajn vestojn.

— Aŭskultu, Sinjoro la Pastro, mi redonos ilin al vi, se vi promesas diri al mia patrino min edzinigi kun « Yvon » ĉe la Sankta Miĥaelo.

— Ŝtelistino ! Mi arestigos vin de la ĝendarmoj !  
Kaj ŝi ridas, ridegas !

— Nu ! vi pravas ! Iru do serĉi la ĝendarmojn !...  
Ha ! Ha !... Nu !... Sinjoro la Pastro, promesu !  
Ĉu tio koncernas vin ? Mi petas tion de vi ?

La Pastro estas frosttremanta pro malvarmo. Li decidiĝas...

— Nu sufiĉe !..... Mi parolos al via patrino.

— Vi promesas, ĉu vere ?

— Mi promesas... Nu, donu rapide, sentaŭgulino...  
Kaj la demono forportu vin !

Ŝi malsupreniras tri metrojn, kaj haltas :

— Ha ! Mi forgesas, Sinjoro la Pastro ; vi devas ankaŭ senkulpigi min !

— Senkulpigi vin ?...

— Jes, pro la ŝerco, kiun mi faris al vi Tiel, vi ne povos rakonti ĝin al mia patro !

Sinjoro « Le Clech » piedfrapas... Per sia dekstra



mano, li signas en la spaco konfuzan geston.....

Sufiçe ! sufiçe !! Mi senkulpigas vin... *Ego te absolvo* ! filino de la diablo !... kaj zorgu mian poŝhorloĝon !!!

Liaj dentoj krakas... « Yvonne » malsupreniras zorge, rigardante sian suferulon, demetas la vestojn sur la sablon, dek metrojn antaŭ la Pastro, kaj saltante kiel kapro, ŝi foriras rapide, rapidege...

Denove sola sur la bordo, Sinjoro la Pastro revestiĝas febre, blovante la korpo blua pro malvarmo... Kaj li pensas melankolie jela granda malvirto de l' infanoj de la centjaro.

Sed fine bona rideto aperas sur lia luna vizaĝo, dum li pensas pri la ĝojo de la Episkopa Moŝto, pri la ĝojego de la kunmangantaro, kiam, proksiman dimanĉon, dum la jara matenmanĝo en la Episkopejo, li rakontos sian malagrablan aventuron.

---

---

## FUNEBRA PAROLADO PRI S<sup>ino</sup> BURĜO

laŭ fama poezio de G. NADAUD

---

Iam, S<sup>ro</sup> Burĝo, bona viro, edzo... feliĉa, komercisto honesta, legis ĵurnalon post la matenmanĝo. Li tralegis plezure la diversajn sciigojn : batalojn,



mortigojn, ŝtelojn, ventegojn, pluvegojn, kiam subite liaj haroj stariĝas ; li paliĝas ; li frotas siajn okulojn, legas kaj relegas tiun ĉi artikoleton : « oni skribas el Havro : hieraŭ, la vaporŝipo « Felikso » dronis en maro. La ŝipo perdiĝis ; krom kvar maristoj, la ŝipanoj kaj traveturantoj pereis en la ondo. »

Imagu lian doloron ! (mi forgesis diri ke S<sup>ino</sup> Burĝo estis sur la ŝipo). Kion faras nia homo ? Li kuras timigita por averti parencojn, la urbestron, la pastron, kaj li revenas hejmen, falas sur seĝon kaj plendas kaj ĝemas laŭte... Mortinta ! ŝi estas mortinta !... Ho, Dio ! Kion de nun mi faros ?... Karlotino, mia duono, kia funebro ! Kia estonteco ! Kia dezerto ! Sur tiun ĉi seĝon ŝi venis sidiĝi... Kia silento ! Tie ĉi ni interparoladis vespere... Adiaŭ, dolĉaj projektoj, niaj familiaj revoj ! Ni deziris knabon... Ni deziris knabinon... Fluadu miaj ploroj ! Miaj okuloj iĝu fontanoj ! El miaj vejnoj mia sango foriru per larmoj ! Ŝia korpo ruliĝas nun en la fundo de la maro... Mia orelo estas fermita por ŝiaj amemaj paroladoj ; mi me aŭdos plu ŝin filozofe dirantan neniaĵojn, kiuj faras la vivon ! Ŝi min riproĉetis kelkafoje, sed ŝi havis riproĉante tiel dolĉan voĉon !...

Ni kolektu niajn pensojn... Estas necese pretiĝi por ĉeesti ĉe la funebra ceremonio ; mi ĝuste bezonis nigran veston... Ho, kara mia duono, pro vi, mi mendos veston kaj mesojn ! ..

Kion mi faros de nun ? Mi ploros certe sed post monato, post 2 monatoj ? mi ekvojiros ! Mia edzino




min tenis ĉiumomente apud si... Rajdante, veturante tra la tero kaj la ondo, mi vidos landojn, konos la mondon : mi vivos ! — Jen la fino de la somero. La ĉaso estas plezuro tre bona por la saneco : ĝi bonigas la korpon, sekigas la larmojn... mi tuj aĉetos ĉaspermeson. Karlotino al mi ĉiam malpermesis la ĉason. Kiom da persekutaĵoj dum dek kvar jaroj ! Mi estas kvardek jara, kaj mi povas komenci. Mi volas aĉeti pafilon kaj ĉashundojn : ĉio kune povos kosti mil frankojn... Ne grave ! Ŝi malriĉigis min pro tualetoj... Dio ŝin pardonu ! De nun, mi, malriĉa edzo, iĝos fraŭloriĉa, mi de nun vivos dank'al mia bieneto, kiel princo. Jen mi estas trankvila, neambiciema, rentulo, fraŭlo, heredeblo onklo ! Dio ! kiom dolĉa ŝajnas la libereco por malliberulo ! Mi havos bonan fajrujon, bonan liton, bonan loĝejon, bonan kelon... mi spiras, vivas, mi estas freneza, dudekjara !

Mi volas legosciencan lerni... Kaj mia kuzino Adelino ? Ŝi esta bona, dolĉa, bela... Ŝi min amegas... Ho, ho, mia karulo, vi okupiĝos pri Adelinoj poste... Apenaŭ vi esta libera... Ve ! malfeliĉa edzino ! Dio akceptu vian animon... Sed, se la ŝipo ne estus pereinta ! Ne... « vaporŝipo "Felikso" »... la nomo troviĝas vere sur la ĵurnalo, kaj la ĵurnaloj neniam elpensas falsaĵojn... Ŝi estas mortinta, vere mortinta... kaj dum mi volas plori, mi eksentatas rideton...

Kaj se oni dirus : « vi havas la povon ŝin revivigi, ĉu vi volas ŝin revidi ? » — Neniu min aŭdas... mi respondus : « ne, mi ne estas tiel malsprita ! Dio





bone faras tion, kion li faras, lia volo estu ! » Kaj se oni proponus al mi plie mil, dumil, dekmil frankojn ? mi dirus : « la mono estas nenio por mi ; mi estas ne subaĉetebla. » Dekvin mil ? Ne ne ! — dudek mil... Ĉe tiuj ĉi vortoj, ekbato forte frapita resonas ĉe la pordo.

— Ĉielo ! mia edzino, vi ?

— Mi !

— La diablo vin forportu !, li diris mallaŭte, maristo ŝin estis savinta. Kie ? Kiel ? Ŝi ne scias, sed li ŝin savis... Karlotino promesis al maristo ĝuste dudek mil frankojn. Necese estis pagi !

Tiel S<sup>ro</sup> Burĝo, por reaĉeti sian edzinon, elspezis dudek mil frankojn. Dio akceptu lian animon !

---